

N-ro 1/2003

Únor/februaro 2003

Enhavo – obsah:

Nia agado en la pasinta jaro	2	Zemanová: Konfeso de la virino	17
Aperis nova PIV	3	Č. Vidman: Fragmentoj de ...	18
V. Ludíková: Sendu ĝin pluen	6	Karen: Serĉado de la Blua Tono	19
B. Němcová: Fabelo pri mielkuka...	7	W. Shakespeare: Sonety	24
Z. Bergrová: Ĉio flugas	9	La bildo ne revenis el la kosmo	26
Z. Bergrová: Feliĉo, aŭdigu vin	12		

-----

La regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiuĵaŭde en la kunvenejo en Praha 1, Ve Smečkách 25, kun jena programo:

13 – 14 h Libera tribuno – novaĵoj pri Esperanto, ĝeneralaj informoj, ambaŭlingve

14 – 16 h Gramatiko kaj ekzercado de konversacio, nur en Esperanto

16 – 18 h Kurso por komencantoj – gvidas s-ani Marta Šmidrkalová

Atenton!

Ĵaŭde la 27-an de marto 2003 okazos Jarkunveno de nia klubo inter la 15-a kaj 17-a horoj. La ĉefa temo estas elekto de nova komitato de la klubo. Ĉeesto de ĉiuj membroj estad dezirinda.

Atenton!

Ĵaŭde la 24-an de aprilo la kunveno ne okazos, ĉar samtempe okazos en la Praha Ekspoziciejo aparta Esperanta kultura programo (vidu apude) de la 15-a ĝis la 15.50 horo.

Atenton!

Somere en julio kaj aŭgusto, la kunvenoj de nia klubo ne okazos. La unua postsomera kunveno okazos denove ĵaŭde la 4-an de septembro 2003.

En la ĉi-jara Internacia Libro-Foiro Svět knihy 2003 okazonta en la Praga Ekspoziciejo, estos ekspoziciitaj ankaŭ Esperantaj libroj.

Konekse kun tio aparta Kultu-programo pri Esperanto por la neesperantista publiko okazos ĵaŭde la 24-an de aprilo 2003 de la 15-a ĝis la 15.50 horo. Estos prezentita konciza informo pri Esperanto kun deklamado de Esperantaj poemoj kaj kantado de Esperantaj kantoj kaj operarioj. Pensiuloj pagos nur duonan enirpagon.

-----

Ve ĉtvrtek 24. dubna 2003 bude na knižním veletrhu Svět knihy 2003 na Výstavišti zvláštní esperantský Kulturní program s informací o esperantu a s přednesem esperantských básní a písní včetně operních árií v esperantu.

-----

Pravidelné schůze Klubu esperantistů v Praze se konají každý čtvrtek odpoledne v Praze 1, Ve Smečkách č. 25.

Dne 27. 3. 2003 bude výroční členská schůze s volbou nového výboru.

V červenci a srpnu se schůze klubu nekonají.

Antaŭ 50 jaroj en marto 1953 aperis la unua numero de la Bulteno de Esperantista Klubo en Praha.

La Bultenon redaktis Josef Vítek, al la legantoj dissendis ĝin Anči Bárochová. La Bulteno estis stencilita, A4-formata, en eldonkvanto 600 – 700 ekzempleroj. La unuopaj numeroj estis kutime 2-paĝaj, do unufooliaj. En la jaro 1953 aperis 9 numeroj kun la suma nombro de 20 paĝoj.

La 1-a numero havis fruntloke la citaĵon el Zamenhof: Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos, esti lupoj unuj kontraŭ aliaj... Kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo.“

Sekvis klubaj informoj kaj Monda Kroniko kun informoj pri la movado eksterlande. La postaj numeroj enhavis ankaŭ la Programojn de klubaj vesperoj kaj iam ankaŭ poemojn.

### **La agado de Esperantista Klubo en Praha en la jaro 2002.**

Dum la jaro 2002 la kunvenoj de nia klubo okazis regule ĉiujarde posttagmeze en la kunvenejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25. Tiun ĉi kunvenejon disponigas al nia klubo la loka kvartalo oficejo en Praha 1 senpage. Sed dum la someraj monatoj – julie kaj aŭguste – la ejo restas fermita kaj niaj kunvenoj ne okazas.

La programo de niaj kunvenoj estas grandaparte konversacia, pri kio meritas ĉefe s-anino H. Maudrová, sed en la apuda ĉambro okazas kurso por komencantoj, gvidata de s-anino M. Šmidrkalová. De tempo al tempo tamen okazis interesaj prelegoj, ekz. la 31-an de januaro s-ano Sládeček el Ostrava rakontis pri siaj Esperanto-renkontiĝoj kaj projekciis lumbildojn, la 28-an de marto prelegis en nia klubo s-ano Drahomír Kočvara, la 5-an de septembro en solena postferia kunveno partoprenis Drahomír Kočvara, Miroslav Smyčka kaj ĉeestis ankaŭ s-inoj Podmelová kaj Ludíková, la 5-an de decembro 2002 kaj poste denove la 9-an de januaro 2003 nia membrino St. Kníchalová prelegis pri sia ĵus okazinta ekskurso al suda Ameriko kaj montris abundajn fotografiaĵojn. La jarkunvenon la 14-an de marto vizitis ne nur niaj pragaj gepoetoj E. Urbanová, Ĉ. Vidman kaj Z. Bergrová, sed ankaŭ eksterpragaj samideanoj L. Chytil el Přešov kaj M. Smyčka el Ústí n. L. Niajn kunvenojn vizitis ankaŭ eksterlandaj esperantistoj el Francio kaj el Usono. Tre sukcesa estis ankaŭ la tradicia Kristnaska vespero la 12-an de decembro 2002.

Nia klubejo estis ankaŭ je dispono de Asocio de esperantistoj – handikapuloj, kiuj okazigis tie kelkajn kunvenojn dum la jaro.

Niaj klubanoj partoprenis ankaŭ kelkajn Esperantajn aranĝojn en Prago, organizitajn de ĈEA, ekz. la 7-an de februaro la solenaĵon honore al 80-jariĝo de Eli Urbanová en la Ĉefa fervoja stacidomo en Prago, la 16-an de aprilo la kunvenon kun la vicprezidanto de UEA prof. H. Tonkin en la hotelo Mucha, kaj de la 8-a ĝis la 10-a de novembro la Konferencon pri Aplikado de Esperanto en la Sciencoj kaj Tekniko en Dobřichovice. Kelkaj membroj partoprenis la ĉeĥan-esperantan poezian vesperon de Věra Ludíková en la Poezia kafejo Obratník (Tropiko) en Smíchov la 12-an de decembro vespere.

Bedaŭrinde la jam tradicia aŭgusta renkontiĝo en la domo de s-anino Maudrová en Karlštejn ne okazis pro inundo, kiun tiu ĉi domo suferis. Cetere per la inundo estis damaĝita ankaŭ la tuta deponejo de Esperantaj libro de firmao KAVA-PECH en Dobřichovice, la posedaĵo de nia membro Petro Chrdle, inter ili ankaŭ ekzempleroj de la ĵus eldonita nova PIV.

Ni povas fieri, ke la membro kaj komitatano de nia klubo s-ano Petr Chrdle partoprenis la 87-an Universalan Kongreson en Fortaleza, Brazilo; la 5-an eŭropan Esperanto-kongreson en Verono, Italio, ĉeestis s-anino Zubová. Krome niaj klubaninoj partoprenis ankaŭ la 55-an kongreson de katolikaj esperantistoj en Kroměříž (s-anoj Budínská kaj Matoušová) kaj la 4-an kongreson de Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Janské Lázně (Bínová, Lorencová, Helmeczyová, Vrbová, Hoffmanová, Souček).

Sed la ĉefa aranĝo de la jaro 2002 estis la Solenaĵo de la Centjariĝo de nia klubo kaj la jubilea 10-a Kongreso de ĈEA, kiuj okazis de la 15-a ĝis la 17-a de novembro 2002 en a kulturcentro Zahrada en la praga kvartalo Chodov.

Jam unu semajnon antaŭ la solenaĵoj estis tie inaŭgurita ekspozicio pri Esperanto, kiun sukcese aranĝis s-ano Zdeněk Heiser. Ĉefloke de la ekspozicio estis instalita la jam historia busto de L. L. Zamenhof, farita de ĉeĥa skulptisto Emanuel Kodet por la 13-a UK en la jaro 1921; la busto estis prunteprenita el la Esperanto-muzeo en Česká Třebová. La ekspozicio estis publike alirebla ĝis la 22-a de novembro.

Okaze de la centjariĝo de la klubo estis eldonita broŝuro „Centjariĝo de la Esperantista Klubo en Praha“ – nekompleta kompilaĵo de la Esperantaj eventoj en Prago dum cent jaroj. Plue aperis nova poemaro de Zdenka Bergrová „Vortoj de la Nokto“ kaj poemaro de Jiří Karen „Mondo afabla ne nur al vortoj“ – ambaŭ tradukitaj de Jaroslav Mráz.

Salutmesaĝoj al la klubo venis i. a. de la Bolonja Esperanto Grupo „Achille Tellini 1912“ el Italio, de Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Brno k. a.

La solenan kulturan vesperon vendrede la 15-an de novembro enkondukis kaj vorte akompanis Lucie Karešová. En la unua parto de la vespero la rusa pianistino kaj komponistino Jelena Puchova, loĝanta en Prago, prezentis kantojn de M. Bronštejn kaj kun infana ĥoro „Opera Praha“ kaj kun Miroslav Smyčka ŝi prezentis kantojn el sia muzikalo „La Eta Princo“ kun vortoj de M. Bronštejn. En la dua parto de la vespero Jelena Puchova plane akompanis la operkantistojn Kateřina Kudlíková, Miroslav Smyčka kaj Josef Vich, kiuj prezentis pecojn el operoj, operetoj kaj ankaŭ popolajn kantojn.

Sabate okazis la jubilea 10-a kongreso de ĈEA, dum kiu estis elektita nova komitato de ĈEA, fruntloke kun la prezidantino Věra Podhradská. En la nova komitato estas ankaŭ pragaj geesperantistoj Lucie Karešová kaj Petr Chrdle (vicprezidantoj), Jindřich Ondráček (kasisto) kaj Jiří Souček (membro de kontrolgrupo). Estis ankaŭ proklamitaj novaj honoraj membroj de ĈEA, inter ili ankaŭ la prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha Jiří Patera; tio estas granda honoris ne nur por li, sed precipe por la tuta klubo okaze de ĝia centjariĝo.

Post vespermanĝo okazis dancvespero, kiun komencis la Grupo de akrobata rokenrolo de Sokol Kampa Praha, gvidata de Miroslava Kuchtová, sekvis muzikista duopo el Dobřichovice, poste s-anino Pavla Zemanová kun sia hundineto Dája prezentis dancon el la irlanda muzikalo „La sinjoro de danco“ de Michale Flatley kaj fine jam sekvis la ĝenerala dancado kaj tombolo.

(jpa)

#### Aperis La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

Ĝi kuŝas antaŭ mi, la bela, granda, impona volumo de la nova PIV. Post la unua eldono de PIV, redaktita de Prof. Gaston Waringhien, aperis nun la nova reviziita eldono, redaktita de emerita docento Michel Duc Goninaz. Tridek du jarojn post PIV aperis do la nova PIV (NPIV). Ĝi estas verko, pri kiu ni esperantistoj povas fieri kaj kiun ni povas fiere montri ankaŭ al neesperantistoj. Ili povas konvinkiĝi, ke Esperanto ne estas nur ia – tia lingvo por korespondado aŭ por gazetlegado, sed vere vivanta kaj praktike utiligata lingvo.

Granda avantaĝo de NPIV estas, ke ĝi forigas la tro fakajn aŭ neutilajn terminojn, korektas iujn kaj aldonas novajn kaj uzatajn vortojn, kiel aidoso (kial ne ajdoso?), biosféro, fotokopii, teflono, vide ktp. Bona estas la forigo de la vorto „arbedo“ kaj uzo de „arbusto“, por ke ne okazu konfuzo inter tiuj ĉi du vortoj. Tame iom ŝokas min la divido de arboj je arbegoj (ĝis 100 m), arboj (8-15 m) kaj arbetoj (6-8 m), dum 2-7 m altaj estas trunkarbustoj, 0,5 – 4 m tufarbustoj kaj malpli ol 0,5 arbustetoj. Nu, por mi 6 metrojn alta arbo tute ne estas arbedo, sed vera arbego.

Bona ŝajnas al mi ankaŭ la forigo de la vorto „tetrao“ (ĉeĥe jeřábek), kiu nun estas nomata „bonazio“, dum la vortoj „tetro“ (teřívek) kaj „tetraono“ (tetřev) restas kaj apartenas al la familio (ĉeled') de „tetraonedoj“ (tetřevovití).

Tre bona estas la listo de matematikaj operacioj sur la pĝ. 813 – 814. Precipe salutinda estas la decido uzi la prepozicion „per“ sole por la divido, kaj ne – kiel ĝis nun – ankaŭ por la potencado. Tiel oni enkondukas ordon en la matematikan terminologion, en kiu ekde nun la dividado estas farata per la prepozicio „per“, ekz. ses per tri estas du, dum la potencado estas farata per aparta help-vorto „alt“, ekz. ses alt tri estas ducent dek ses. Same bona estas la listo de matematikaj simboloj sur la pĝ. 1039 – 1040.

Same bonaj estas la formoj de landnomoj laŭ la vera uzado de esperantistoj, ekz. koreo – Koreio, kaj ne la neuzata Koreo – koreano; same vjetnamo – Vjetnamio, kaj ne la monstra Vjet-Namo. Tamen tute ne plaĉas al mi la uzado de la vorto „regno“ por „ŝtato“. Ŝajnas al mi, ke „regno“ apartenas en mezepokon aŭ en fabelojn, dum nuntempe ja ekzistas „ŝtatoj“. Por multaj maljunaj ĉeĥoj „Regno“ egalas al „Germanio“, ekz. la regnaj ras-leĝoj = la germanaj ras-leĝoj. Tial en la ĉeĥa lingvo la vorton „regno“ ni preskaŭ tute evitas kaj eĉ en la ĉefa preĝo ni diras „venu reĝlando via“ tie, kie en Esperanto estas „venu via regno“.

Ampleksa estas la listo de literoj, signantaj aŭtorojn de cititaj vortoj aŭ frazoj, ekz. Z – Zamenhof, A – Auld, AM – A. Montagut k. a. Tamen min mirigas, ke tie ne troviĝas Ivo Rotkvič, kies traduko de Cezaro de Jelušić alportis al Esperanto multajn utilajn formojn.

La vortaro estas „ilustrita“ kaj precipe tre utile estas, ke la ilustraĵoj troviĝas interne de la teksto; iuj bildoj estas tre praktikaj kaj instruaj, ekz. biciklo (pĝ. 154), birdo (pĝ. 157), boriloj (pĝ. 166) kaj multaj aliaj. Sed male iam detalaj priskriboj mankas, ekz. sur la pĝ. 159 la plej oftaj figuro jen blazonoj estas: paliso, trabo, kapo, kalkano, herolda kruco, bendo, kontraŭbendo, andrea kruco, ĉevrono kaj kantono (laŭ Jaroslav Klement. Heraldiko-veksilologio-terminaro en Esperanto, EK La Progreso, České Budějovice, 1979).

Mi komprenas, ke la aŭtoroj devis koncizigi klarigojn en a vortaro, por ke ĝi fine ne devu esti duvolema. Tial ekz. pri Eŭropo estas klarigoj, ke ĝi estas parto de la mondo kaj amatino de Zeŭso, sed mankas, ke ĝi estas ankaŭ luno de Jupitero; Azio estas ne nur kontinento, sed ankaŭ planĝeto n-ro 67, Bohemio, lando en Ĉeĥio kaj ankaŭ vivmaniero sen sociaj konvencioj, estas ankaŭ planĝeto n-ro 371; Otavo estas la ĉefurbo de Kanado ĉe la samýma rivero, sed Otavo estas ankaŭ rivero en la suda Bohemio ktp., ktp.

Bedaŭrinde en NPIV ne troviĝas iuj utilaj kaj bezonataj vortoj, kiel „kolino“ (monteto) aŭ „hilo“ (arbarkovrita monteto); longe mi serĉis la tre gravan vorton „fervojo“: tiu vorto memstare en NPIV ne troviĝas, ankaŭ sub „fero“ mi ne trovis ĝin, nur sub „vojo“ ĝi ricevis 4-linian klarigon. Tamen anstataŭ „transporto“ mi trovis la verbon „transporti“ kun referenco al „porti“, tie mi trovis la deziratan „transporto“ kun du signifoj, ĉe kiuj la ĉefa – la unua – ricevis unulinian klarigon. Ŝajnas al mi, ke tiuj jak aliaj gravaj esprimoj, eĉ se kunmetitaj vortoj, devus havi propran lokon en la vortaro kaj kun klarigoj respondantaj al ilia graveco.

Mi devas konstati, ke en NPIV ne troviĝas ankaŭ multaj nomoj de diverslandaj valutunuoj. Al Esperanto iuj riproĉas, ke ĝi estas tro eŭropa, sekve ĝuste ekstereŭropaj valutoj pliinternaciigas la Esperantan vorttrezoron. Mi do serĉis afganio (kodo AFA), la mon-unuo de Afganio – en NPIV ĝi mankas, bahto (THB), la monunuo de Tajlando – manka, balboo (PAB), la mono de Panamo – mankas, biro (ETB), la mono de Etiopio – mankas, ĉu mi daŭrigu? Centoj da tiaj valut-monoj kaj de ties partumaj unuoj tute ne troviĝas en NPIV. Jes, la ĉefaj eŭropaj jak aliaj valutoj ĉeestas (eŭro, pundo, franko, marko, liro, peseto, peso, dolaro, eno, juano k. a.), sed ekz. ĉe kecalo estas referenco al kvetlo, kie estas sciigo, ke ĝi estas nacia birdo de Gvatemalo, sen mencio, ke kecalo/kvetlo (GTQ) estas monunuo de Gvatemalo. (Pri valut-nomoj vidu: Jiří Patera: La nomoj kaj simboloj de diverslandaj valutoj, en: Zdeněk Pluhař (red.): Fakaj aplikuj de Esperanto, KAVA-PECH, 2000).

Tamen, por mi la plej interesa afero en NPIV estas la forlaso de la finaĵo –a de virinaj nomoj kaj la reveno al la Fundamentaj formoj de virinaj nomoj kun la ĝusta substantiva finaĵo –o (Klaro, Mario, Sofio, Diano). Ĉar la propraj nomoj estas nur iaspeca periferia fenomeno, tial ne multe gravas, ĉu ili estas neasimilitaj (Mary, Anne, Louis), aŭ asimilitaj laŭ la Esperanta ĝenerala sistemo (Mario, Anno, Ludoviko), aŭ kiel aparta Esperanta subsistemo (Maria, Anna, Luizo). Per la enkonduko de nesistemaj sufiksoj „ĉj“ kaj „nj“ la kreinto de la lingvo mem montris, ke la propraj nomoj en Esperanto ne devas konduki precize laŭ la ĝenerala sistemo de Esperanto, sed ili povas roli alimaniere. Cetere ankaŭ iuj morfemoj de la ĝenerala sistemo havas alian signifon en aparta subsistemo, ekz. „id“ en la ĝenerala sistemo signifas ido (katido, hundido...) aŭ posteulo (Karolidoj, Izraelidoj...), sed en subsistemoj ĝi povas esti uzata en kemio (klorido, sulfido...) aŭ en gastronomio (Cefeidoj, Leonidoj, Orionidoj...) kun tute malsamaj signifoj. (Pri la ĝenerala sistemo de Esperanto kaj pri la subsistemoj vidu: Michel Duc Goninaz: Pri la reguleco de Esperanto, en: Petr Chrdle (red.): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto, KAVA-PECH, Dobřichovice (Praha), 1995.) Sekve se „id“ havas aliajn signifojn en la subsistemoj de Esperanto ol en la ĝenerala sistemo de Esperanto, same bone la adjektiva finaĵo –a de la ĝenerala sistemo povas funkcii kiel substantiva ĉe propraj nomoj, ĉu viraj (Cefanja, Elija, Eliŝa), ĉu virinaj (Adela, Agata, Agnesa) en la subsistemo de propraj nomoj.

Iuj lingvoj distingas sekson ĉe la nomoj, ekz. Alberto – Alberta, Aleksandro – Aleksandra, Andreo – Andrea ktp. kaj estis tre prudente, ke ankaŭ Esperanto adoptis tiun distingadon, kompreneble apud la regulaj virinaj formoj Albertino, Aleksandrino, Andreino ktp. Por Kalocsay kaj Waringhien estis Esperanto ne nur bonege funkcianta mekanismo, por ili ĝi estis vere vivanta kaj pulsanta organismo; pro tio ili preferis la etnolingvajn duopojn. Ekzistas centoj da tiaj duopol (mi citu ankoraŭ kelkajn: Danielo – Daniela, Emanuelo – Emanuela, Eriko – Erika, Frederiko – Frederika, Gabrielo – Gabriela, Henriko – Henrika ktp.) kaj estus tre neprudente kaj malproduktive nuligi ilin nur pro tio, ke ĉiuj substantivoj havas la finaĵon „o“ kaj sekve ne estas permeseble, ke virinaj nomoj havu la finaĵon „a“. Cetere eĉ en NPIV mi trovas ekz. ke Mario estas nomo de viro aŭ de virino, kaj tuj sube troviĝas Maria. Virina nomo. Same: Teodoro. Vira nomo. Teodora. Virina nomo. La enradikiĝo de la virinaj a-nomoj estas jam tiom forta, ke eĉ NPIV ne povis ilin komplete eviti. Sed mi ripetas, ke la problemo de propraj nomoj estas nura periferia fenomeno, kiun troigi ne havas sencon.

Mi bonvenigas la belegan kaj valoran vortaron kaj al ĉiuj esperantistoj mi deziras grandan ĝojon kaj pleuron dum la ĉerpado de scioj el tiu ĉi impona verko.

Jiří Patera

Mezinárodní esperantské muzeum ve Vídni v Hofburgu představuje největší esperantskou knihovnu, která je součástí rakouské Národní knihovny. V elektronickém katalogu TROVANTO <http://allegro.onb.ac.at/cgibin/allegro/maske.pl?db=esperanto&lang=esp> je už 29 tisíc záznamů knih, brožur, rukopisů, hudebních not, kazet i videokazet.

Loňská OSIEK-prémie za nejlepší knihu roku v jazyce esperanto byla udělena knize Karla Štajnera *7000 dní na Sibíři* (překlad Krešimir Barkovič). Přesvědčení komunista Štajner v téměř 500-stránkové knize líčí svůj 20-tiletý pobyt v sibiřském gulagu. Připomeňme, že předloni byla prémié OSIEK udělena člence našeho klubu Eli Urbanové za román *Hetajro dancas (Hetéra tančí)*.

Věra Ludíková

## Sendu ĝin pluen

Sur oran tableton komunan kun Kosmo vi devas enskribi legeblan komunikon. Se vi havus jam malmulte da tempo, nur kelkajn momentojn, se restus al vi eĉ la lasta spiro, kion vi sendus en Kosmon? Ĉu arĝentaj kluzoj tion jam tinte finkantis? Vi rerigardas kaj en kupraj vazoj vi ekvidos flamantajn fajrojn, post ili brilon. Kaŭrantaj, la antaŭuloj volis jam antaŭlonge varmigi sin ĉe profetaj vortoj. Nerezistebla sopko renkonti teranon, vian instruiston kaj iri ankoraŭ pluen, vin kondukis al seĉado de io en kristaleca formo, tial en krisolo vi naive Midas kombinaĵojn. Eĉ vi mem tre deziras ĉerpi el la fonto de la scienco kaj de la nesciado de la homaro ne nur tial, ke vi serĉas feliĉon aliloken forvagintan, ankaŭ ne tial, ke multaj parolos malrespekte kaj mienos, kvazaŭ vi eĉ ne estus tie, arogante ili estos konstruantaj antaŭ vi digojn. Sed vi antaŭsentas, ke forbalaos de la korteto forputrintan foliaron nur printempa frosto, kiam estos malbone, tre malbone. Envolvita en propraj retoj pendas jam nur sur la plej maldika fadeno la iam perfekta mondo. Nur en ekstremo ni eniras plu en Viajn vortojn por refreŝiĝi, Sinjoro nia. Kvazaŭ arĝentaj kordoj subite eksonus kaj iriza sago de ekkono preterflugus nin: spirita homo estas ĉi tie kaj lasa sen siaj spuroj rozajn kaj luman brilon, kiu kuracas kaj kuraĝigas. Subtile kaj ale varpiĝas la strukturoj de malnova Tero, kvazaŭ vi nobligus linfadenon kaj poste vi silice teksus ĝin. Ne timu, la Kosma menso certe frustros la solvon al la aŭskultantoj. Sur la frunto kristala diademo kun surmetitaj smeraldoj kaj kun io ĝis nun nemalkovrita registras kaj akceptas por Vi la kosman energion. Tiel kiel en Siksta kapelo je distanco la mano de Kreinto preskaŭ tuŝas la manon de Adamo, ĝuste tiel vi poste ricevos tiom da energio, kiom da ĝi vi bezonos, ĉiam laterite, ĉar la vivo dume antaŭeniĝos, pli prokrmen al la respondeco, se la okulaj irisoj estas via nekonfuzebila identigo. Nur nia tasko estas, ke en Kosmo ekregu amo, nia grandega riĉaĵo. Sur etan ladpladeton, sur la restaĵon de ora masko, sur brelokon, kiun vi portas sur la kolo, en la lasta minuto skribu vian mesaĝon, se ankaŭ vi volas prepari bonan estontan historion: kun Patro kaj lia amo, kiun ni transdonas, sur unu ŝipo ni troviĝas. Sendu ĝin pluen...

(tradukis Jaroslav Mráz)

*Jen estas la vortoj de poetino Věra Ludíková, kiujn ŝi sendas kun la kunfondintoj de tiu ĉi alvoko al ĉiuj spiritaj homoj, por ke ili aliĝu al ĝi. La ideo pri ĝi naskiĝis nerimarkite. La kuracisto kaj poeto Jan Mička tiam diris: „Ni havas similajn opiniojn pri la misio de la poezio kaj kiam ni estos du, tio estas pli or nur unu. Tri estas pli ol du.“ Kaj mallonge poste, kiam ĝi estiĝis, aliĝis al ĝi kaj estas ĝiaj kunfondintoj tiaj personuloj, kiel la pentristo Jan Kristofori, la poeto Jan Pyszko, kiu la tekston „Sendu ĝin pluen“ tradukis en la polan, la poetino Berta Cibulková, kiu la tekston tradukis en la germanan, d-ro Bohuslav Eliáš-Žáček, CSc., kiu tradukis ĝin en la latinan, la poeto Josef Lebeda kaj aliaj, inter ili la membroj de la Esperantista Klubo en Praha.*

Výše uvedená duchovní výzva „Pošli to dál“ básničky Věry Ludíkové v esperantském překladu Jaroslava Mráze vyjde v knižní podobě spolu s překlady do ostatních jazyků.

Božena Němcová

## Fabelo pri mielkuka dometo

Estis malriĉa patro kaj havis du infanojn, Joĉjon kaj Margenjon. Li irbis en arbaran lignon haki kaj ne povis gardi la infanojn; tial post kiam ilia patrino, la patrino de malgrandaj infanoj, mortis, li edziĝis, por ke la infanoj denove havu patrinon. Sed la alia patrino ne estis bona, ŝi amis nek la patron, nek la infanojn, kaj la patro havis kialon por plendi. Foje la duonpatrino tiel eknaŭzis pri la infanoj, ke ŝi ordonis al la edzo, ke li forkonduki ilin por ke ili ne plu revenu hejmen; vane la viro rezistis la infanojn forkonduki, sed la edzino ne lasis lin trankvila, li timis ŝin, kaj tial kun malĝoja koro iun tagon li diris al la infanoj: „Prenu kruĉetojn, vi iros kun mi en la arbaron kolekti fragojn.“ La infanoj pro ĝojo saltis, tuji li prenis kruĉetojn kaj kun la patro en a arbaron ili celis. Kiam ili venis profunde en la arbaron, alkondukis ilin la patro al granda senarbejo plena de fragoj, kie ĉio ruĝiĝis, kaj diris a lili: „Nu, karaj miaj infanoj, ĉi-loke pluku fragojn, mi iros tiu-direkte arbojn faligi; ĝis kiam vi aŭdos min frapi, vi scios, ke mi estas en tiu loko.“ La infanoj avide ĵetis sin al la fragoj kaj la patro foriris flanken, alligis inter arbojn ŝtipbatilon, kiu de la vento movata la arbojn frapadis, kvazaŭ oni lignon hakus. Kiam li tiamaniere la infanojn trompis, li revenis hejmen kaj la infanojn en la arbaro li forlasis.

Kiam la infanoj havis jam plenĉen kruĉojn kaj ĝissate ili manĝis, ili ekpensis, ke ili la patron rigardu. – Ili do iris, de kie de tempo al tempo la frapado de l' batilo aŭdiĝis, sed ili ne trovis paĉjon, nur lia batilo pendis sur arbo „Kie nur nia paĉjo estas, eble li iris hejmen kaj nin li lasis ĉi tie,“ diris Joĉjo. – „Sed kion vi pensas, la paĉjo tamen ie estas kaj certe li venos por ni, ni nur restu ĉi tie,“ diris Margenjo.

Kaj ili do atendis kaj pro enuo ii ree manĝis la fragojn el la kruĉoj, ĝis la kruĉoj estis malplenaj – kaj ili devis denove plenigi ilin, kaj tiel ili malenuis. Sed komencis krepuskiĝi, la batilo ĉesis frapi kaj la infanoj sentis angoron, do ili prenis la kruĉojn kaj iris serĉi la patron. –

„La suno subiras, vespero alias, paĉjo, ni iru hejmen!“ ili vokis tra la arbaro; sed neniun reagon ili aŭdis. „Do ni jam vojeraris, kara Joĉjo, kaj la paĉjon ni ne trovos; ni devas ĉi tie tranokti,“ diris Margenjo; ŝi estis pli aĝa kaj pli saĝa.

„Sed mi timas,“ postdiris Joĉjo.

„Nu, atendu do, mi suprengrimpos arbon, ĉu mi ekvidos ian lumon, kaj al tiu direkt ni poste irus,“ ĝojigis lin Margenjo kaj tuj ŝi ankaŭ sur la arbon grimas. – De sur la arbi ŝi rigardis ĉirkaŭronde kaj kiam ŝi ekvidis malproksime lumenton, ŝi ekvokis al Joĉjo, ke li ne plu timu, ŝi descendis kaj en la direkt de la lumo ili ekiris. Kaj ili elvenis el la arbaro sur verdan herbejon; sur tiu herbejo ili ekvidis belan dometon, kaj la dometo estis mielkuka. Ili iris ĝis fenestreto, enrigardis internen kaj vidis tie sidi maljunan virinon kaj maljunulon.

„Atendu,“ diris Joĉjo, „mi surgrimpos la tegmenton, derompos peco da marcipano kaj ni fartos bone.“

„Sed ĉu ili kapton nin,“ Margenjo sentis timon – sed Joĉjo jam estis sur la tegmento kaj rozpis marcipanerojn kaj al Margenjo malsupren ĵetis.

Do sendis la maljunulino la maljunulon, ke li iru rigardi, ke ŝajnas al ŝi, kvazaŭ iu rompus la marcipanon Iris la maljunulo eksteren kaj demandis: „Kiu sur mia tegmento rompas la marcipanon?“

„Ho ne, aveto, blovas nur venteto,“ per subtila voĉeto respondis Margenjo sub la fenestro – kaj la maljunulo kontentiĝis. La infanoj satmanĝis kaj sub la fenestro ili ennestiĝis por dormi.

- Matene Joĉjo denove srugrimpis la tegmenton por rompi pecon da marcipano, kaj la maljunulino denove sendis la maljunulon por rigardi. – Margenjo ree volis la maljunulon missciigi, sed li vidis ilin kaj iris diri tion al la maljunulino.

„Rapide, Joĉjo, ni devas forkuri, aliokaze ni falos malbone,“ vokis Margenjo al Joĉjo, ĉar ŝi aŭdis, ke la maljunulino sendas la maljunulon, ke li alkonduku la infanojn, ke ŝi rostos ilin.

- Joĉjo saltis de sur la tegmento, Margenjo kaptis lin je la mano, kaj ili kuris, kiom ili povis kaj kien ili la okuloj gvidis, kaj la maljunulo postkuris ilin, sed ĉar li estis dika kaj malgracia, li ne povis postsekvi ilin. Sed tamen la infanoj ne sukcesus eskapi de li, se subite virino ne aperus sur lina kampo.

„Mi petas vin, onklino, diru al mi, tra kie ni iru; malbona maljunulo el mielkuka dometo pelas nin, ili volas rosti nin, ĉar ni peceton de tegmento forrompis.“

„Tie ĉi iru en la arbaron, tra tiu ĉi vojeto, mi ja stenos la maljunulon,“ diris la sarkistino kaj montris al la infanoj en la arbaron.

La infanoj kuris plu, kaj post momento alkuris la maljunulo kaj forte spiregis.

„Persono,“ li demandis la sarkistinon, „ĉu vi vidis ĉi tie infanojn?“

„Mi sarkas linon,“ respondis la virino, kvazaŭ ŝi ne komprenus lin.

„Persono, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie tri infanojn?“

„Post kiam mi finsarkos kaj ĝi maturiĝos, ni rikoltos.“

„Persono, komprenu do, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Post kiam ni rikoltos, ni frotegos la semojn kaj poste ni ruos la linon.“

„Persono, ĉu vi ne komprenas, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Post la ruado ni sternos kaj en fornego sekigos.“

„Persono, vi eble estas surda, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Nu, kaj post la sekigo ni frotos kaj post la frondo ni brosos.“

„Persono, ĉu vi ne aŭdas, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Do; nu kaj post la posado ni surmetos sur konusojn kaj ŝpinos.“

„Persono, tio ne koncernas min, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Kiam ni ŝpinos belajn gracilajn fadenfaskojn, ni surbobenigos ilin.“

„Persono, persono, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Post kiam ni surbobenigos, ni teksos belan maldiketan tolon.“

„Persono, min ne koncernas tolo, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Post kiam ni teksos, ni blankigos, post kiam ni blankigos, ni tondos kaj kudros ĉemizojn, subĉemizojn, vindotukojn kaj diademojn, jupojn kaj antaŭtuketojn.“

„Persono, ĉu vi sidas sur viaj orloj, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Ho, tiel, kion ni faros kun tio? – Nu, ni vestos nin per tio kaj surhавos puran belan tolaĵon.“

„Persono, mi petas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Post kiam ni disŝiros tion? – Nu, tiam ni ekflamigos tion, ni faro sel tio tindron. Nu, por la tindro ni elips fajrerojn tiel longe, ĝis ĝi aperigos vivan flameton kaj la dia fajro ĝin konsumos. La dia fajreto ŝanĝiĝos en fumon, la fumo ascendo al la aero kaj mi ĉesas paroli pri la afero.“

„Persono, mi ne demandis vin pri tio, mi demandas vin, ĉu vi vidis ĉi tie iri infanojn?“

„Infanoj, nu, tion vi devis diri tuj, kial mi ne vidus ilin, nu vere mi vidis, ili iris tie tra la vojeto en la kampoj, rekte al la rivereto, kie la salikoj estas. Sed vi ne plu kurantigos ilin, ili saltis kiel kestreltoj,“ ĉe tiuj vortoj la virino montris al la maljunulo la kontraŭan direkton, ol kien ŝi pli frue la infanojn sendis La maljunulo ekkomprenis tion, pro kolero li forkraĉis kaj reen hejmeniris, kaj kiam li foriris, ankaŭ la virino el la kampo malaperis kaj la infanoj venis hejmen.

tradukis Jiří Patera



Zdenka Bergrová

## Ĉio flugas

Igoro kaj Marko kune ofte ludis la ludon, „ĉio flugas, kio plumojn havas“. Vi ja konas ĝin. Unu elkriis ion, la alia devis levi la manojn, kiam la krianto nomis ion ajn, kio flugas, ale li devis doni garantiaĵon. Eĉ por penskaptilo. Oni donas garantiaĵon por ĉio, kio ne flugas, ĉu ĝi havas plumojn aŭ ne havas. Sen plumoj flugas multaj, ekzemple muŝo. Aŭ kulo. Mallonge ĉiuspeca insekto. Sed troviĝas en tio ĝuste ankaŭ kaptiloj. Diru mem, ĉu eblas decidi, ĉu vere flugas polvo, aŭ ĝi nur tiel moviĝas en la aero...? Aŭ anĝeloj. Pri tio estis granda disputo, ĉar kiu scias, ĉu la anĝeloj entute ekzistas, kaj kiu plie esploras, ĉu ili havas flungilojn kaj flugas. Sur bildoj ili plej ofte flugilojn havas, sed la brakoj ne mankas al ili kiel al Bivoj.

„Eble da flugiloj estas grandaj padeloj,“ proponis Marko, ĉar li levis la manojn kaj estas dononta pro anĝeloj garantiaĵon.

Momenton estis silente.

„Ho ne,“ kontraŭstaris Igoro, ili entute ne flugas, ili havas nur alojn.“

„Nu, ĝuste, alojn. Tiuj havas eĉ plumojn,“ defendis sin Marko.

Ili konkludis, ke anĝeloj estas ĉiam nur sur bildoj, en realo ili nenie troviĝas, tial Marko malvenkis.

Tamen por fluganta tapiŝo Igoro ne devis doni garantiaĵon, eĉ se ankaŭ li estis en konfuzo, li levis la manojn, sed fluganta tapiŝo estas reala nur en fabeloj. – Sed al Igoro ĉiuj hejme favoris... Li estis ĉarulo, li ne povis iradi.

Flugantaj objektoj, kiuj propre ne havas kialon por flugi, estas multaj. Nu, kvereloj estis multaj kaj multaj.

Kiam Igoro estis hejme sola, li ĉiam kvazaŭ ludus – ĉio flugas. Pri nenio alia li pensis, nur pri la flugado. Ĉu oni povas aranĝi la aferon iel pli konvene, ol kiel dume oni ĝin inventis.

Post kiam Igoro troviĝis sur la ĉareto, li estis tre malĝoja. Kiom li nun bedaŭris, ke li saltis en akvon, kiun li ne konis, kie li ne sciis, kiel profunde estas la fundo kaj kia la fundo estas. Li opiniis, e li montros al la leporkoroj, kiuj gapis sur la bordo, kiel li tion faras, kia bravulo li estas. Fine Marko eltiris lin apenaŭ vivantan. Ili devis longe revivigi lin kaj kiel estis eble plej rapide ili forveturigis lin en malsanulejon. La gepatroj faris al si riproĉojn, ke ili la knabojn lasis iri al akvo, eĉ se – estas ja ĝuste konduki la buben al memstareco. Ili havis fuŝitan libertempon kaj Marko feriojn, kaj ankaŭ la tuta grupo da buboj estis poste pro la malbonŝanca vundiĝo de Igoro longe konsternita, nu kion fari. La kamaradoj fine mense skuis sin kiel baniĝintaj hungoj kaj friponis plu, nur la plej proksimaj, la gepatroj kaj Marko estis trafitaj por ĉiam. Kaj Igoro.

Post reveno el la malsanulejo kaj el bankuracejo, kie doktoroj lin resanigis kiel nur estis eble, kaj kie li ellernis veturi sur ĉaro, venis nur la plej malbona tempo. Paĉjo kaj panjo devis reveni en siajn laborpostenojn, Marko vizitis lernejon, ili ne povis esti daŭre ĉe Igoro. Li lernis zorgi pri si mem, antaŭ ol iu el ili denove venos hejmen. Baldaŭ li tion ellernis, li scipovis sur la ĉareto vagi tra la tuta loĝejo, ankaŭ trans sojlojn, li havis ĉemane telefonon, televidon, radion, videon paĉjo aĉetis, li havis taskojn el la lernejo, kie li faros ekzamenojn, li havis magnetofonon kaj sonbendon kaj laŭdire li havos tekokomputilon kaj aliron al interreto, nur kiam la paĉjo perlaboro sufiĉe da mono – sed tamen nur ...

Kaj kiam li do foje priverŝas florojn kaj englutas larmojn, ĉar li devas kliniĝi de sur la ĉareto anstataŭ stari bele super ili, subite li aŭdas:

„Vi devus ĉesigi la ploraĉadon, Igoro.“

„Kio?“ li demandis mirigite.

„Nu, mi diras, ke vi devus ĉesigi la ploraĉadon. Estas nenia heroeco salti en akvon, kiun vi ne konas, ĝi estas sufiĉe granda stultaĵo. Neniu alpuŝis vin tien. Vi faris tion mem. Do klopodu rebonit almenaŭ tion, kio eblas.“

„Nu, ĝuste, kion eblas rebonit. Kaj entute, atendu, kio vi estas? Ĉi tie estas neniu, nur la floroj kaj mi.“

„Do, rigardu la fenestron,“ ektrilis iu.

„Tie eksidis pasero,“ konstatis Igoro.

„Kaj ĉu pasero estas neniu?“

Nun jam Igoro sciis, kiu tie trilas.

„Ne, mi ne opinias. Mi ĝojas, ke vi parolas.“

„Estas certe. Mi ĝojas, ke vi aŭdas min. Min ja ne aŭdas ĉiu.“

„Sed – kion mi povus rebonigi. Pri nenio alia mi pensas. Se mi eble... se mi ne povas iri, do mi povus flugi kiel vi... Do – flugi estas propre pli ol iri, sed se mi jam statas tiel ĉi, tial por mi flugado estus rekompenco.“

„Nu vidu.“

„Sed... Rogalon mi ne havas, helikpteron – pri tio mi eĉ ne parolas.“

„Rigardu en spegulon,“ diris la pasero.

Igoro rapide alveturis al spegulo – kaj konsterniĝis. Malantaŭ lia dorso leviĝis grandegaj padeloj – kaj jen eĉ ŝosis io kiel flugiloj. Ne, flugiloj tio ne estis, fakte eĉ ne padeloj – estis paseraj flugiletoj. Li turnis sin al la pasero kaj elbuŝigis:

„Mi havas flugilojn!“

„Ankaŭ mi dirus,“ ridis la pasero. „La pasera konsilantaro decidis, ke vi ricevos flugilojn. Vintre, kiam ĉion kovris neĝo kaj ni malsatis, vi ŝutis por ni ĉi tien sur la fenestron paneretojn... Do pro tio..“

„Do mi povus iomete flugeti?“ demandis nekredeme Igoro.

„Provu tion,“ respondis la pasero. „Kaj feliĉan vojaĝon.“

Igoro eksvingis la flugilojn kaj jen, efektive li leviĝis preskaŭ ĝis la plafond. Li tuj ekstiris iom malalten – ankaŭ tio eblis. Por momento li sidigis sin reen en sian ĉareton.

„Pasero, kamarado,“ li diris kortuŝite, „mi dankas al la paserkonsilantaro...“

La pasero ne respondis kaj entute ĝi aspektis, kvazaŭ ĝi ne kapablas kalkuli ĝis kvin.

Igoro provis iom ekflugi ankoraŭfoje – sed li eĉ ne residigis sin – kaj frr – li forflugis en la kuirejon. Kaj reen. La fenestro estis malfermita, li ekis ekkursi.

Li do flugas, tie estas la lernejo, iomete plue Ludvo – ĉu vidas lin flugi la homoj malsupre, kiel li vidas ilin? Ŝajnas, ke ne, ili ja devus miri, ĉu ne?

Post tempeto tiu ĉi okulado en la plej proksima ĉirkaŭaĵo ne sufiĉis al li. Ĉu li rigardu ien pli malproksimen en la mondon... Kaj uj li ankaŭ ekvojaĝis tien.

Li flugis kaj flugis kaj post momento li estis super Londono. Sonoris tie Big Ben. Li vidis la gvardi-alternon ĉe la palaco, sed li ne kuraĝis malsupreniĝi, li ja havas flugilojn, kiel lin eble akceptus la fremdaj homoj. Kaj subite li ekkonsciis, ke li ne kapablas paroli kun ili. Mi devus lerni la anglan lingvon, li ekhavis la ideon. Sed kion, li povas flugi ankaŭ alilanden, egale ĉi tie en Anglio estas sufiĉe malvarme.

Kaj tuj li ankaŭ flugis. Ĝi ne daŭris tro longe kaj li estis super Egiptio. Li vidis piramidojn. Kiel ofte li revis, ke li ŝatus rigardi ilin. Nun ili estis ie nemalproksime sub li, sed li ne povis malsuprenflugi kaj laŭorde trarigardi ilin, kiel li enŝteliĝus en iun turistan ekspedicion – kun tiuj siaj flugiloj.

Ne gravas – li flugos pluen. Super Ĉinio li rimarkis, ke tie ĉiuj peze laboras, ie eĉ infanoj. Super Hindio li vidis postsekvojn de tertremo. Kiel li kompatis la hindojn, la surŝutitajn kaj vunditajn infanojn aparte...

Sur la tero estas sufiĉe da turmentado, li ekpensis. Kio okazus, se mi – se mi ekflugus tiom multe alten, ien en la universon. Nu – pli malproksimen, ol kien venis kosmonaŭtoj, tien eble ne, sed ien, kie ili estis. Eble su la lunon.

Kaj li flugis, ĝis li estis – vi ne kredos tion al mi, sed li estis malalte, malaltete super la luno... Ĉar nenie li vidis eĉ vivuleton, li malsuprenflugis kaj volis surtreti – kompreneble ne la teron, sed la lunan grundon, sed...

Kion diablo ne volis, li eniĝis preskaŭ ĝisgenue en polvon. Eksterordinare estis, ke liaj piedoj ne estis tiel pezaj kiel hejme, sed ke ili bone portus lin, tio ankaŭ ne. Kion nun. Li ne povis moviĝi de la loko. Ĉirkaŭe dezerto kiel en Saharo. Ankoraŭ pli granda dezerto, ankoraŭ pli sola... Se ĝuste nun alvenus kosmonaŭtoj, li ekpensis. Certe ili helpus al li. Sed tute ne, ili ne venis. Vane li observis la lunan firmamenton. En malproksimo li vidis la bluan planedon, nian teron... Li sentis angoron... Li estis ploronta... Ĉu se li ne sukcesos suprenflugi kaj mizere li pereos ĉi tie sur la luno... Li provis svingi la flugilojn, sed ĉu li svingis kiel ajn, leviĝi li ne povis. Li provis do rampi iom aliloken. Li vokis por helpo la panjon, paĉjon, Markon, kaj poste ankaŭ la kamaradon paseron, sed neniu respondis al li.

„Marko,“ li diris laŭte. „Kiam ni ludos – ĉio flugas – mi ne plu volos ne pagi garantiaĵon, kiam mi eraros...tion mi promesas al vi...“ Sed neniu bona intenco helpis. Kvankam Igoro promesis orajn montojn.

Tio daŭris longe, la kruroj de Igoro estis nemoveblaj. Ni devas nur juste diri, ke li ne ĉesis klopodi. Li helpis al si kuraĝe per la manoj kaj per la flugiloj, kaj tamen post ioma tempo li forrampis iom pluen. Kaj subite li ne rampis tra polvo, sed tute ramp-laca li eksentis sub si ian rokon. Li frapdeskuis la polvon kaj provis svingi la flugilojn. Vidu, ĝi eblis.

Li levis sin super la lunan surfacon. Kaj mi diros al vi, ke pri nenio alia li tiom sopiris, kiel reveni reen sur la teron.

Li flugis kaj flugis laŭhazarde, sed verŝajne helpis lin la amo al la hejmo, kiun havas la migruj birdoj, kiam ili superas la longajn distancojn por veni en la lokojn, kie ili nestas, kaj li venis rekte super la tegmento de sia hejmo, li malsupreniĝis iomete pli malalten, estis tie ankoraŭ ĉiam malfermita la fenestro – kaj Igoro rap! – jam li estis super la ĉareto. Li sidigis sin en ĝin, momenton li ripozis kaj poste li momenton pensis, pripensis jak ekrigardis la fenestron.

La pasero tie ne estis.

„Pasero, kie vi estas...“ diris Igoro kaj daŭrigis, ĉar li pensis, ke tia sofista pasero lin tamen aŭdas, „sciu, pasero, tio estis bela, sed ankaŭ terura, mi petas vin, pasero, ĉu vi ne povus peti la paseran konsilantaron, ke mi ne plu havu la flugilojn? Sciu, mi tre ŝatus havi ilin, sed se mi jam nun diferencas de ceteraj buboj, tiam kun la flugiloj mi diferencus ankoraŭ pli – tiom pli, ke tio eĉ ne eblas.“

„Nu, bone,“ aŭdiĝis iu.

Igoro rigardas, strebas diveni, kiu parolas.

„Ĉu estas vi, pasero,“ li demandas, „kaj se ne, kiu vi estas?“

„Ĉu vi eble opinias, ke la floroj paroli ne scipovas?“

„Nu, mi jam opinias nenion,“ diras rapide Igoro.

„Mi estas ciklameno. Vi havas min rekte antaŭ via nazo.“

Vere, Igoro sidis en sia ĉareto antaŭ florkorbo kaj en ĝi floris ciklameno. En la komenco de la historieto pri la flugado li ja ĝuste akvumis ĝin kun la aliaj floroj.

„Ni ciklamenoj propre ankaŭ havas flugilojn, la niaj estas similaj al la papilioj, pro tio oni nomas nin papiliacoj.“

„Nu jes, sed vi ne flugas,“ rimarkigis Igoro.

„Ne. Sed ni ankaŭ ne iras, Igoro. Ni estas ĉiam sur unu loko, eĉ per ĉareto ni ne veturas, kaj tamen ni vivas... Ni estas pro tio dankemaj ankaŭ al vi. Pro tio, ke vi akvumas nin, sekve se vi vere volas senigi vin de la flugiloj, mi tion aranĝos.“

„Ke vi ne bedaŭru,“ aŭdiĝis de la fenestro. Kaj vidu. La pasero sidis tie.

„Se mi kapablas decidiĝi...“ Igoro perdis la certecon. „La flugilojn mi volus kaj ankaŭ ne volus. Ĉu mi ne povus pruntepreni ilin ĉiam nur por mallonga tempo, kiam mi estas hejme sola?“ li demandis la paseron.

„Mi ne scias,“ diris la pasero. „Mi povas tion proponi al la pasera konsilantaro.“

„Dankon, dankon jam pro la eksperimento,“ diris Igoro. „Sed sciuj, nun jam estas venonta Marko el la lernejo, mi petas vin, ne koleru, mi... bezonus...“

„Kiel mi vidas, sufiĉas, ke vi rigardos en la spegulon...“ diris preskaŭ samtempe la pasero kaj la ciklameno.

Igoro tuj alvenis al la spegulo – post la flugiloj eĉ n postsigno.

Post momento revenis Marko – kaj finiĝas nia fabelo.

Tradukis J. Patera

Zdenka Bergrová

## Feliĉo, aŭdigu vin

Hana, Vlasta, Madla kaj Eva estis elstare scivolemaj bubinoj. Ili sciis, kio ie okazis, ĉar ili ĉion diris al si reciproke, kion ili vidis aŭ aŭdis, kiam ili devis por momento disiri. Alikaze ili ĉiam estis kune. Ili serĉeme vagaĉis tra la tuta ĉirkaŭaĵo, ili konis ĉiujn lokajn hundojn kaj katojn, kaj male ĉiu ajn sciis pri ili. Eĉ momenton ili ne estis trankvilaj. La gepatroj kaj sinjorino instruistino ne sciis, kion fari kun ili, ĉefe pro tio, e la bubinoj firme tenis kune, unu ne allasis klaĉi pri alia.

„Vi estas hodiaŭ ia stranga, Eva,“ diris Vlasta en parko apud la lernejo.

„La niaj volas divorci,“ ekploris Eva.

„Kaj kial?“ demandis Hana.

„Mi ne scias. Ili eĉ ne multe kverelas.“

„La niaj kverelas fervore, sed ili ne divorcos,“ rimarkigis Madla.

„Diru a lili, ke vi estas malfeliĉa pro tio,“ konsilis Vlasta.

„Mi jam diris. Sed paĉjo diris, ĉu estas feliĉo vivi kune, se pro tio ili estas malfeliĉaj.“

„Kio entute estas – la feliĉo...“ elbuŝigis Hana.

Momenton ĉiuj silentis.

„Mi opinias, ke la feliĉo signifas esti bela,“ diris malrapide Madla.

„La feliĉo estas havi ĉion, pri kio vi nur ekpensas,“ revis Hana. „Sed poste vi ne plu havos ion por deziri.“

„Estus necese precize trovi, kio estas la feliĉo,“ rezonis Eva.

„Sed kiel?“ aldonis Vlasta.

Sed subite preterflugis io kiel papilio, sed ĝi ne estis papilio. Ĝi estis malgranda pupo, ludilo en bebokombineo.

„La feliĉo estas mi,“ ĝi vokis per subtila voĉo. Kaj ĝi malaperis en la aero.

La bubinoj restis ŝokitaj.

„Kaj vidu,“ diris post momento Hana. „En la lernejo ni recitas la poemeton – muŝeto nura e loro, vespere tuŝas al koro – kaj ĝi estas dume io kiel pupeto por ludi, sed viva kaj en bebokombineo.“

„Estas necese trovi tute precize, kio la feliĉo estas,“ ripetis Eva. „Sed kiel, mi konsentas kun Vlasta.“

„Kaj ĉu eble demandi,“ aŭdiĝis Madla.

„Demandi multajn homojn,“ kompletigis Eva.

„Mi estas por tiaspeca ekspedicio, sed ni ja devas viziti la lernejon, poste hejme tagmanĝi, poste... simple ni havas multajn devojn...” oponis Hana.

Kaj jen je ŝiaj kruroj froté sin kato. Kaj tuj ankoraŭ alia. Ili estis senhejmaj katoj, la bubinoj verŝis al ili en pelvetojn en arbustoj iom da lakto, kiun ili alportis en kuvetoj el la hejmo, kaj tiel nutris ilin.

„Mi scius kiel,” miaŭis la kato.

„Ĉu ni estas en fabelo?” rimarkigis Vlasta. „Vivanta ludpupo, parolanta kato. Sed negrave, do diru, Minjo, kiel tion aranĝi.”

„Mi kaj jen mia mikino estos hejme kaj en la lernejo anstataŭ vi kaj vi povos iri esplori. Ni scipovas transformiĝi.”

Kaj tuj ĝi montris, ke ĝi vere scipovas tion. Apud Eva staris alia Eva, tute la sama.

„Klonaĵo... La kato fariĝis via klono, Eva,” mirigite elspiris Madla.

„Ion mi legis, aŭ aŭdis en la televido, ke oni povas fari klonaĵojn,” ne lasis sin konsterni Vlasta. „Sed ĝi estas tre granda science.”

„Do vidu,” diris per la voĉo de Eva la klonita kato Eva, dum Eva staris kiel kolono... „Ni scipovas tion tre rapide.”

Kaj apud Vlasta tute neatendite aperis alia klonita kato, Vlasta, kaj diris per ŝia voĉo: „Ni helpas al vi, se vi volas.”

„Sed...” balbutis Hana, „vij a ĉion pri ni ne povas scii, ĉefe hejme ili devas esti singardemaj – kaj mi ne scias, ĉu homoj donus al ni respondojn, se ni ne estas plenaĝulinoj...”

„Estas bagatelko,” ekridis la kato Eva. Kaj tuj el ĝi estis plenaĝa fraŭlino.

